

La 20-a de septembro (sab.)

*Marko ☐ : laborlingvo estas la japana.

	2-halo	3-1	5-1	5-2	5-3	5-kuirejo
9:30– 12:00			(J) Kvalifikaj Ekzamenoj de Esperanto laŭ JEI			
13:15– 14:15	Inaŭguro / Komuna Fotado					
14:30– 15:30	☐ [publika] Parolspektaklo pri Esperanto	Kiel utiligi retajn teknikojn en Esperanto- instruado	Kial japanoj ne povas paroli Esperanton? / Ĉu vi povas diri ĉi tion en Esperanto?	Verdaj Ranetoj (Ekzerco de ĥoro)	Savo de korea ŝipvrako fare de japanoj	
15:45– 16:45	[publika] Manĝotabloj en Aziaj landoj	Kantu kun Kajto!	Kanĝi-vortaro por lernantoj	Vendreda Zoomo	Paroliga kurso (elementa)	
17:00– 18:30	Interkona Vespero					
18:30– 19:00	Prezentadoj de partoprenantoj					

La 21-a de septembro (dim.)

*Marko ☐ : laborlingvo estas la japana.

	2-halo	3-1	5-1	5-2	5-3	5-kuirejo
9:15–10:15	Kiel ĝisdatigi nian movadon? (=Dialoga kunsido laŭ la stilo de "World Cafe")	Oomoto	Prelego de Ossaka Premio (ĝis 10:00)	El Okayama	Goo	
10:30–11:30			Okayama kaj Esperanto	☐ [publika] Enkonduka Kurso	Kiel Eklerni Artpentrado?	
13:15–14:15	☐ [publika] Atombombitoj en Hirosima kaj kantoj por Paco	Danco Maumere (Indonezio)	Esperanto-movado en Azio kaj Oceanio	budhana kunsido	Esperanto-turismo (Indonezio)	Spertu japanan kuiradon!
14:30–15:30				Ĉambro de Junuloj	Paroliga kurso (meza)	Fabelo: Momotarō
15:45–16:45	☐ [publika] Verda Majo	Ĝuu muzikon kun "mitt"	Studraporta Kunsido de JEI	Reuzado de ŝtofo		Tajlandeca restoracio
17:00–17:50	Verda amikeco inter Koreio kaj Japanio					

La 22-a de septembro (lun.)

*Marko ☐ : laborlingvo estas la japana.

	2-halo	3-1	5-1	5-2	5-3	5-kuirejo
9:15– 10:15	Kiel funkcias Seula Esperanto- Kulturcentro?	Internacia Meditado de Ŭonbulismo	☐ Ĝenerala Kunsido por la anoj de JEI	ILEI-anoj	Germanio 35 jarojn post la reunuiĝo	
10:30– 11:30	Fermo					

12

Dum la kongreso funkcias jenaj ĉambroj:

5-a etaĝo: 5-ripozejo (japansila ĉambro por libera ripozo) *nur en la 21-a

6-a etaĝo: 6-babilejo (libera spaco por babilado)

7-a etaĝo: 7-salono (Akceptejo, libroservo, Budoj)


Laŭvolaj Eventoj

Bankedo (en la 21-a 18:30–21:00)

Duontaga Ekskurso (en la 22-a 13:30–18:00)




Postkongresa Ekskurso (en la 23-a 9:00–16:30)

Plano de Kongresejo



En la 6-a etaĝo troviĝas libera spaco “6-babilejo”.
Tie oni povas libere babili, trinki kafon aŭ teon, ktp.

6-a etaĝo



Programeroj

《enkonduka klarigo》

(dato) komenca–fina horo [ĉambro]

titolo de programero

Klarigo pri programero.

la 20-a de septembro (sabato)

(20-a) 9:30–12:00 [5-1, 5-2, 5-3]

Kvalifikaj Ekzamenoj de Esperanto laŭ JEI
--

Ekzamenoj 4 gradaj por japanlingvanoj (skriba kaj parola).

(20-a) 13:15–14:00 [2-halo]

Solena Inaŭguro

Kongresanoj kune malfermos la kongreson, kaj honorigas premiitojn de la Premio Ossaka kaj Literatura Konkurso de JEI. Prezidos s-ro Aoki Haruka el Okayama.

(20-a) 14:00–14:15 [2-halo]

Komuna Fotado

(20-a) 14:30–15:30 [2-halo]

[publika]

Parolspektaklo "Komunikado inter diverslingvanoj kaj Esperanto" (en la japana lingvo /日本語番組)

S-ro YAMADA Kanto kaj juna esperantisto el Hiroŝimo interparolos pri Esperanto, kaj prezentos allogecon de Esperanto al tiuj, kiuj renkontis ĝin por la unua fojo.

2021 年の日本エスペラント大会の実行委員会のメンバーとして活躍した山田寛人(かんと)さんが、その大会の開会式で司会を務めた若手エスペ란ティストと対談をして、エスペラントに初めて接するみなさんに、その魅力を伝えます。

(20-a) 14:30–15:30 [3-1]

Kiel utiligi retajn teknikojn en Esperanto-instruado

Jenaj du prezentoj kaj diskuto.

"Kial kaj kiel utiligi surretajn filmetojn por krei originalan instrumaterialon" (TIDA Syuntaro)

(resumo) Kvankam ekzistas multaj lernolibroj kaj instrumaterialoj por instrui Esperanton, instruistoj senĉese kreas proprajn materialojn por uzi en siaj klasoj -- mi estas unu el ili. En mia parolado, mi volas atentigi, ke la Esperanto-movado devas provizi lernantojn per enhavoj amuzaj kaj facile alireblaj por junuloj. Mi sugestos, ke la utiligo de mallongaj surretaj filmetoj povas esti unu rimedo por veki ilian intereson. Aparte utilaj estas unulingvaj filmetoj sen eksplicita eduka celo.

"Propono konstrui virtualan centron de aŭtonoma lernado" (KITAGAWA Hisasi)

(resumo) Seriozaj Esperanto-lernantoj estas ofte aŭtodidaktoj, kiuj instruas sin mem sen gvidanto. Ni eble povos helpi ilin per kvazaŭbiblioteko de diversaj lerniloj: sonmaterialoj, ekzercoj, filmetoj, vortlistoj, ktp. krom tradiciaj libroj. Tie, la lernantoj mem decidas kion lerni kaj serĉas taŭgajn lernilojn el la sortimento ofertata en la "biblioteko", aŭ alivorte "centro de aŭtonoma lernado". Certe ne eblos fizike konstrui tian centron. Sed en la nubo? Per modernaj retaj teknikoj? Atendataj estas ĉeestoj ne nur de instruistoj, kursgvidantoj, sed ankaŭ de inĝenieraj, helpopretaj komputilistoj.

(20-a) 14:30–15:30 [5-1]

Kial japanoj ne povas paroli Esperanton?

Ĉu vi povas diri ĉi tion en Esperanto?

Prelegos: s-ro YAMAKAWA Syuiti

Veterana esperantisto prelegos sub jenaj titoloj:

"Kial japanoj ne povas paroli Esperanton?"

(Invito al la kunsido de libera konversacio "Sabata Kunsido")

"Ĉu vi povas diri ĉi tion en Esperanto?"

(Prezento de la vortaro "Nuntempaj Japanaj Vortoj kaj Esprimoj en Esperanto")

(20-a) 14:30–15:30 [5-2]

Korusa ekzercado de Verdaj Ranetoj

Por prezenti post la Interkona Vespero ni ekzercos en du voĉpartoj jenajn 4 kantojn: Floraro, Arirang, Edelvejsa, La lingvo por ni. Kantoamantoj, kolektiĝu!♪

(20-a) 14:30–15:30 [5-3]

La rakonto pri savo de korea ŝipvrako fare de japanoj

Antaŭ 125 jaroj unu korea komercŝipo rompiĝis pro ŝtormo en la maro inter Koreio kaj Japanio. Loĝantoj de japana fiŝkaptista vilaĝo trovis ŝipvrakon, kaj savis homojn sur la ŝipo. Vilaĝanoj bonkore flegis ilin 8 tagojn. Post tio ĉiuj 93 ŝipanoj povis reiri al siaj hejmlokoj en Koreio.

Per bildlibro mi prezentos la rakonton pri amikeco trans diferencoj en lingvo kaj kutimoj. (Prezentos s-ro KITAGAWA Syozi)

(20-a) 15:45–16:45 [2-halo]

[publika] Manĝotabloj en Aziaj landoj
(en Esperanto kun japana klarigo /日本語解説つき)

Junuloj el aziaj landoj prezentos ĉiutagajn manĝaĵojn kun fotoj. La moderiganto donos klarigojn en la japana lingvo.

アジア各国から参加した青年の皆さんが、日常の食事を写真で紹介します。日本語の解説がつきます。

(20-a) 15:45–16:45 [3-1]

Kantu kun Kajto! – kantoateliero de Kajto

Nederlanda kanto-grupo, Kajto gvidas partoprenantojn kanti en Esperanto. Komencantoj, progresantoj, progresintoj, kaj eĉ neesp-istoj, ĉiuj povas elkore ĝui kantadon en Esperanto.

(20-a) 15:45–16:45 [5-1]

Kanĝi-vortaro por lernantoj en diversaj lingvoj

Prelegos: s-ro Jack Halpern

La preleganto jam de multaj jaroj okupiĝas pri kompilado de Kanĝi-vortaroj en diversaj lingvoj. (Esperanta eldono aperis en 2019.)

(20-a) 15:45–16:45 [5-2]

Vendreda Zoomo (Venzo)

Ni venzoanoj havas regulan zoomrenkontiĝon en ĉiu dua vendredo dufoje monate. Okaze de ĉi kongreso ni volas havi renkontiĝon realan kaj ĉiuj partoprenantoj havos tempon libere paroli laŭ temo. La temo estas " Kio okazis ĉe vi aŭ ĉirkaŭ vi dum du semajnoj? "

(20-a) 15:45–16:45 [5-3]

Esperanta Paroliga Kurso 1 (por komencantaj lernantoj)

Eminjo el Singapuro (nun loĝas en Japanio) gvidos la kurson. Vi povas ĝui liberan babiladon.

(20-a) 17:00–18:30 [2-halo]

Interkona Vespero

Ĝuu renkontiĝon kaj interkonatiĝon kun partoprenantoj el diversaj landoj per simpla ludo.

(20-a) 18:30–19:00 [2-halo]

Prezentadoj de partoprenantoj

Tempo de prezentadoj de partoprenantoj.

la 21-a de septembro (dimanĉo)

(21-a) 9:15–11:30 [2-halo]

Kiel ĝisdatigi nian movadon? (=Dialoga kunsido laŭ la stilo de "World Cafe")

La difino de "World Cafe (Monda Kafejo) " estas kunveno okazanta en malstreĉa etoso, kvazaŭ ripozado en kafejo. Partoprenantoj estas dividitaj en tablojn de kvar aŭ kvin kaj konversacias ĉe ĉiu tablo, kaj ĝi povas okazi kun pli ol 1000 homoj. Post kiam pasis certa tempo, la membroj ĉe la tabloj estas interŝanĝitaj kaj la konversacio ripetiĝas. Konversacianta en malgranda grupo, estas facile aŭdi la opinion de la alia persono kaj esprimi vian propran opinion. Eblas nur aŭskulti. Ĉi tie ni interŝanĝu opiniojn koncerne al la kongresa temo kaj kune pensu kiel ĝisdatigi nian movadon. Ĉefaj punktoj estas jene:

- ♦ Internacia kunlaboro
- ♦ Informado
- ♦ Instruado, lernado
- ♦ Junuloj

Zorgantoj: Hirohiko, Hisasi, Masaya, Sin'iti, Tamara, Ikuko

(21-a) 9:15–11:30 [3-1]

Oomoto

Prezento de aktivado de Oomoto per Esperanto kaj geamikoj esperantistaj de Oomoto rakontos pri Oomoto. Elsendo de filmoj rilate al Oomoto.

(21-a) 9:15–10:00 [5-1]

Prelego de la Premiito de Premio Ossaka 2025

Prelegos: s-ro Sibayama Zyun'iti

S-ro Sibayama, eksa prezidanto de JEL, longe agadas en diversaj kampoj de esperanto-movado, ekz. eldonado (i.a. "Esperanto-Japana Vortaro"), kongreso (i.a. la 92a UK en Jokohamo), lokaj grupoj (i.a. NPO Esperanto-Jokohamo), ktp.

(21-a) 9:15–10:15 [5-2]

El Okayama

Prezentoj de membroj de Okayama Esperanto-Societo. (Pri eniga aparato por supersignoj, prezento de Esperanto-klubo de mezlernejo Sanyo-gakuen, vidindaĵoj de Duontaga Ekskurso, volontulaj helpantoj (mezlernejanaj kaj studentoj) dum la kongreso, ktp.)

(21-a) 9:15–10:15 [5-3]

Goo / Baduk / WeiQi

Planataj estas 3 temoj.

1. Enkonduko al Go-ludo por interesatoj.
 2. Spertuloj ĝuu liberajn ludojn sur malgranda tabulo.
 3. Okazos ĝenerala kunsido de Japana Esperantista Go-Asocio
- Vizitantoj ricevos enkondukantan ludilaron.

(21-a) 10:30–11:30 [5-1]

Okayama kaj Esperanto

Prelegos: s-ro GOTOO Hitosi

Okayama ludis la lulilan rolon por la Esperanto-movado en Japanio. En tiu regiono disvolviĝis diversaj esperantaj aktivadoj kaj naskiĝis pluraj elstaraj esperantistoj. En la prelego ni sekvos la 120 jarojn da historio, fokusiĝante al kelkaj elstaraj figuroj, kiel Edward Gauntlett, Yagi Hideo kaj Suzuki Masumi ktp.

(21-a) 10:30–11:30 [5-2]

[publika] Enkonduka Kurso de Esperanto

Enkonduko de Esperanto por japanlingvanoj

1. Kion celas Esperanto.
 2. Kia lingvo estas Esperanto.
 3. Ni povas fari frazojn por interamikiĝi.
- Gvidos s-ro FUKUI Masaharu el Okayama.

岡山エスペラント会の福井政春さんの指導で、

1. エスペラントとは何のための言葉か
 2. エスペラントはどんな言葉か
 3. エスペラントで簡単な文章を作ってみよう
- の3つの内容を学びます。

(21-a) 10:30–11:30 [5-3]

**Babilado (prezidata de HO Song) :
Kiel Eklerni Artpentradon?**

Tie oni povas interŝanĝi opiniojn pri la temo, kaj trovi aŭ lerni bonan manieron por sia eklerno. Iam poste oni povus ankaŭ organizi retan internacian renkontiĝon por tiu celo.

(21-a) 13:15–15:30 [2-halo]

**[Publika] Preĝo por paco
– Atombombita sperto en Hiroŝimo kaj kantoj por paco
(en la japana lingvo / 日本語番組)**

Parto 1: Prelego pri atombombita sperto (en la japana lingvo)

Prelego de s-ino OSIOKA Taeko, kiu estas atestita de Urbo Hiroŝimo kiel "heredanto de spertoj de atombombado", kaj daŭre transdonas la atestojn de atombitoj. Ŝi rakontos al ni pri la atombombita sperto de Park Nam-ju, kiu apartenas al dua generacio de koreoj vivantaj en Japanio.

Parto 2: koncerto de kantoj en la japana kaj esperanta

Profesia kantistino Noda Junko[Ĵunko] kantas pri siaj pensoj pri paco. Ŝi kantas kun gitaro sep kantojn japane kaj esperante: Blua Ĉielo, Unu Krajono, Gruo, 'Ai sansan', Kion la Mortinto Postlasis, Hejmloko, kaj La Granda Kantado. Poste ŝi voĉlegos bildlibron (poemaron kun bildoj) "Hiroshima no ko (Infanoj de Hiroŝimo)", kiu estis eldonita en lasta julio, kaj estis tradukita en Esperanto per s-ino Senda Noriko en Okayama.

第1部：在日韓国人2世・朴南珠さんの被爆体験伝承講話

広島市から「被爆者証言継承者」に認定された忍岡(おしおか)妙子さんが、韓国人被爆者、パク・ナムジュさんの体験についてお話します。

第2部：平和への歌

歌手の野田淳子さんが、ギターの弾き語りで平和への思いを歌います。「青い空は」「一本の鉛筆」「鶴」「愛燦燦」「死んだ男の残したものは」「故郷」「大きな歌」の7曲を日本語とエスペラントで。後半では、先日出版されたばかりの朗読詩「ひろしまの子」を、日本語と、岡山在住の仙田典子さんの訳によるエスペラントの訳で朗読します。

(21-a) 13:15–15:30 [5-1]

Esperanto-movado en Azio kaj Oceanio

Reprezentantoj de aziaj kaj oceaniaj landoj raportos koncize pri la historio kaj nunaj agadoj en sia lando.

(21-a) 13:15– 14:15 [5-2]

budhana kunsido

Temas ĝenerale pri budhismo; ni diskutos, demandas-respondos, babilos pri diversaj temoj. Ni provos sutrolegadon en Esperanto. Ankaŭ ne-budhanoj estas bonvenaj. Partoprenantoj ricevos senpage broŝuron pri budhismo.

(21-a) 13:15– 14:15 [5-3]

Esperante Spertu Indonezion kun Ilia

Prelegos: Ilia Sumilfia Dewi

Mi ege ŝatas vojaĝi kaj konatiĝi kun homoj el diversaj kulturoj, tradicioj, kutimoj kaj tiel plu. Post mia konatiĝo kun Esperanto en 2009, mi plurfoje vojaĝis al kongresoj, renkontiĝoj eksterlande kaj ankaŭ utiligis la ŝancon turismi. Mi opinias ke Esperanto en turismo estas ponto al monda paco. Pro tio, mi nun fokusiĝas pri Esperanto-turismo en Indonezio utiligante Esperanton en miaj turismaj programoj por ke alilandaj esperantistoj havu ŝancon konatiĝi kun lokaj kulturoj, tradicioj kaj samtempe, la indonezianoj ankaŭ havas eblon konatiĝi kun nia lingvo. En mia prelego, mi montros kiel funkcias Esperanto en turismo.

(21-a) 13:15– 14:15 [5-kuirejo]

Spertu japanan kuiradon!

Ni kune faru japanan tradicion rapidan manĝaĵon "Onigiri (rizbulo)". Ni uzos "Sekihan (ruĝa rizo)", vaporita glueca rizo kaj ruĝaj faboj.



(21-a) 14:30– 15:30 [3-1]

Danco Maumere

Gvidos: s-ino Ilia Sumilfia Dewi

La danco konata ankaŭ kiel "Gemu Fa Mi Re", estas populara danco el Indonezio, origine ligita al la regiono Maumere en la insulo Floreso, provinco "Nusa Tenggara Timur". Ĝi estas unu el la plej konataj kaj amase prezentataj sociaj dancoj en moderna Indonezio. La movoj estas facile lerneblaj kaj ofte ripetigantaj, do ĉiuj povas partopreni, sendepende de aĝo.

La danco fariĝis simbolo de nacia unueco kaj diverseco, ĉar homoj el malsamaj etnoj, religioj kaj regionoj ĝin kune dancas. Kutime homoj dancas "Maumere" por bonvenigi gastojn.

(21-a) 14:30– 15:30 [5-2]

Ĉambro de Junuloj

Kunvenejo por interkonatiĝi kaj interamikiĝi por junuloj.
Kolektiĝu kongresanoj malpli ol 35-jaraĝa de diversaj naciecoj!

(21-a) 14:30– 15:30 [5-3]

Esperanta Paroliga Kurso 2 (por meznivelaj lernantoj)

Tamara el Koreio gvidos la kurson. Vi povas ĝui liberan babiladon.

(21-a) 14:30– 15:30 [5-kuirejo]

Fabelo: Momotaro kaj la Verda Testudo

Prezentiĝos Kamiŝibajo (Teatraĵo kun ilustraĵoj) pri Momotaro. Momotaro estas populara heroo de japana folkloro. Okayama estas konata kiel la naskiĝloko de la legendo Momotaro.

En iu vilaĝo loĝis maljuna geedzo. Unu tagon, la maljuna virino trovis grandan persikon en la rivero. Kiam ili volis tranĉi ĝin, el la persiko aperis bebo. Ili nomis lin "Momotaro" ("Momo" en la japana lingvo signifas persikon.), kaj li kreskis kiel forta kaj brava knabo. Aŭdinte, ke oni en vilaĝo trans la monto estas ĝenata de Onioj (japanaj demonoj aŭ ogroj), li ekiris kune kun hundo por venki ilin.

(21-a) 15:45–16:45 [2-halo]

[publika] Teorio de virina liberigo de Verda Majo

Prelegos: Nishida Chizu (en la japana lingvo /日本語番組)

Verda Majo estis japana esperantisto, kiu loĝis en Ĉinio kaj verkis multajn Esperanto-artikolojn kontraŭ japana imperiismo dum la Dua Ĉin-Japana Milito. Kvankam preskaŭ ĉiuj japanaj virinaj aktivuloj instigis japanajn virinojn al arma kunlaboro, ŝi estis malsama. Kial ŝi faris tiun?

Unue, ŝi observis kruelan bombadon kaj viktimojn de civitanoj en Ŝanhajo, Kanton kaj Chongqing.

Due, ŝi estis esperantisto. Surbaze de la “homaranismo” de Zamenhof, ŝi severe kritikis la diskriminacion kontraŭ la ĉinoj, kiu disvastiĝis en Japanio.

Trie, ŝi spertis severan seksan diskriminacion en Japanio. Ŝi diris, ke faŝistoj estas fatalaj malamikoj de virinoj kaj tiam la solidareco inter ĉinaj kaj japanaj virinoj kontraŭ la faŝismo povas ĉesigi la fajron kaj antaŭenigi la virinan liberigon de ambaŭ landoj.

Tamen, Japanio perdis la militon sen japanaj virinoj stariĝantaj. La problemo de japanaj armeaj “komfortulinoj” kiun ŝi levis ankaŭ ne estis solvita. Mi ŝatus pensi pri la ideo de Teru pri solidareco inter virinoj trans landlimoj.

日中戦争中に、中国から反戦の声を届けたエスペ란チスト長谷川テル(Verda Majo)について、研究者の西田千津さんが講演します。

(21-a) 15:45– 16:45 [3-1]

Ĝuu muzikon kun "mitt" (kantoj kaj komponado)

Japana muzikisto "mitt", kiu estas invitita al ĉi-jara IJK en Indonezio, prezentos kantojn kun gitaro, kaj kondukos nin al la amuzo de komponado. Lernante procezon de komponado ni spertos komponadon. Ni skribos niajn ŝatatajn vortojn, kaj aranĝos ilin en novajn kantojn.

Studraporta Kunsido de JEI

[raportanto 1] USUI Hiroyuki

[titolo] Mao Zedong en la spegulo de Kita Ikki: etnolingva minuskomplekso en Orienta Azio kaj Esperanto

[resumo] La ĉefaj marksismaj teoriuloj kiel Marx, Kautsky, Lenin kaj Gramsci havis negativan opinion pri Esperanto. Tiun tendencon puŝis al ekstremo Stalin, kiu per persekutado neniigis la tiam florantan Esperanto-movadon en Soveta Unio. Grandan kontraston al tiuj homoj faras Mao Zedong, kiu en 1939 esprimis sian subtenon al Esperanto, kaj liaj vortoj ĝis nun efikas por tio, ke Ĉina Popola Respubliko daŭre utiligu la lingvon. Kial tiu ĉi diferenco? Tiu ĉi referaĵo argumentas, ke ni povas situigi la subtenon de Mao al Esperanto en la tradicia etnolingva minuskomplekso en moderna orienta Azio, kiun plej okulfrape montris Kita Ikki en la najbara Japanio.

[raportanto 2] Sibayama Zyun'iti (Eldona Grupo por Ŝimizu)

[titolo] Onomatopeoj kaj Interjekcioj - lingvistikaj konsideroj laŭ Kooiĉi Ŝimizu kaj denunaj esploradoj

[resumo]

S-ro Kooiĉi ŜIMIZU (1940-2021) kolektadis el esperantaĵoj (zamenhofaj, vortaraj, literaturaj ĝis komiksaj), onomatopeojn kaj interjekciojn, ĝis tiam lingvistike nemulte traktitajn, kaj li provis analizi ilin gramatike kaj leksike. Tio estis preskaŭ ne publikigita, sed 'Eldona Grupo por Ŝimizu' kompilis libron el liaj lasitaj manuskriptoj, kaj la rezulto libre aperos ĉe la tago de tiu ĉi studokunsido (espereble vi jam enmanigis ĝin: "Ilustrita Vortaro de Esperantaj Onomatopeoj kaj Interjekcioj").

Tiu ĉi referaĵo prezentas la laboron de Ŝimizu kaj aldonas, kio restas al denunaj esperantistoj por plua esploro de la preskaŭ forgesitaj lingvistikaj kampoj, precipe el jenaj tri temoj: (1) aĵo nova, ĉu esprimo nova?; (2) nacieco / aŭtoreco; (3) bildolibroj / mangaoj.

(21-a) 15:45– 16:45 [5-2]

Reuzado de ŝtofo por ekologio

En nia kunsido ni faros mantukon aŭ alian aĵon el pecoj da ŝtofoj, jam uzitaj aŭ restintaj. Ni kontribuu etan agadon por ekologio!

(21-a) 15:45– 16:45 [5-kuirejo]

Tajlandeca restoracio

Ni kune kuiru kaj gustumu tajlandajn telerojn!

(21-a) 17:00–17:50 [2-halo]

Verda amikeco inter Koreio kaj Japanio inter 1965-2025

Dialogo de SO JInsu (Koreio) kaj IZUMI Yukio (Japanio) ĉe 60-jariĝo de reordiĝo de diplomatia interrilato inter Koreio kaj Japanio de ambaŭ landoj.

la 22-a de septembro (lundo)

(22-a) 9:15–10:15 [2-halo]

Kiel funkcias Seula Esperanto-Kulturcentro?

Prelegos: s-ro LEE Jungkee

Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK) estis fondita en la jaro 1991 por instrui Esperanton al civitanoj. De tiam preskaŭ ĉiumonate okazis Esperanto-kurso tra 34 jaroj. En la kuranta jaro septembre okazos la 381-a kurso. Jen mi volas prezenti historion de SEK kaj kiamaniere ĝi funkciis kun kia edukprogramo.

(22-a) 9:15–10:15 [3-1]

Internacia Meditado de Ŭonbulismo

De 2006 ŭonbulanaj esperantistoj ĉiujare organizas la Internacian Meditadon, ĉi-jare oktobre en Seulo. Ni prezentos pri ŭonbulismo kaj la Internacia Meditado.

(22-a) 9:15–10:15 [5-1]

Ĝenerala Kunsido por la anoj de JEI

(en la japana lingvo /日本語番組)

Jara raporto kaj prezentado, diskutado pri kunlaboroj kun Esperanto-movado de JEI-membroj. Demandoj kaj opinioj estas bonvenaj. Kaj premiiĝos longdaŭraj membroj.

JEI の活動について意見を交換し合う番組です。永年会員の表彰も行います。

(22-a) 9:15–10:15 [5-2]

Kunveno de ILEI-anoj

ILEI-anoj el diversaj landosekcioj kunvenas kaj interŝanĝas opiniojn pri instruado, instrumaterialoj kaj instrumanieroj, k.t.p. Ni ankaŭ celas interamikiĝi por ontaj kunlaboroj.

(22-a) 9:15–10:15 [5-3]

Germanio 35 jarojn post la reunuiĝo – progreso, defioj kaj identeco

Prelegos: s-ino Angela Oehler

En ĉi tiu prelego ni rigardas la vojon, kiun Germanio travivis post sia reunuiĝo en 1990. Post la falo de la Berlina Muro, la okcidenta kaj orienta partoj de la lando devis unuiĝi ne nur politike, sed ankaŭ ekonomie, socie kaj kulture.

Mi montros, kiuj progresoj okazis – ekzemple, en infrastrukturo, vivnivelo kaj politika stabileco – sed ankaŭ pri la daŭraj diferencoj inter la eksa oriento kaj okcidento.

Fine, mi tuŝos la demandon: ĉu Germanio vere unuiĝis en la koro de siaj civitanoj?

Kompreneble mi poste respondas al demandoj kiel eble pli bone.

(22-a) 10:30–11:30 [2-halo]


Solena Fermo

Kongresanoj kune fermos la kongreson, rekonfirmante la fruktojn en la kongreso, kaj esperante al la venonta kongreso.

Salono

En “Salono” funkcias Libroservo, Deponejo, kaj Amikecaj Budoj.

7-a etaĝo : Mapo de Salono



Listo de Amikecaj Budoj

Centro de Internacia Informo pri Esperanto	Libroj kaj dokumentoj pri Esperanto
Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj Nara-Esperanto-Societo (KLEG kaj NES)	Ni vendos diversajn aĵojn: libroj eldonitaj ĉefe de ni, ekz. "Nara la eksĉefurbo en malproksimaj tagoj", "Elektitaj eseoj de Verda Majo", ktp. memoraĵoj de la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio (Nara en 2018), insignoj, k.a.
Koresponda kurso de E-Societo en Numazu	Informiloj pri korespondaj kursoj


Prezentoj el Okayama kaj nia movado	Mapoj kaj paneloj prezentas la urbon Okayama kaj ĝiajn allogaĵojn; ĉeesto de gvidantoj ebligas ankaŭ rektan informadon. Ni prezentas ankaŭ la duon-tagan ekskurson, kun bildoj kaj klarigoj, kaj montras filmeton pri la Okayama Esperanto-Societo kaj Rondo Kuraŝiki Esperanto. Ĉarmaj insignoj kaj etaj esperantaj trezoroj kompletigas la etoson de nia budo.
Eldonejo Horizonte	Eldonaĵoj de mia eldonejo Horizonte kaj aliaj esperantaĵoj
Retaj Amikoj	Vizitu la budon kaj; ĝuu la kontaktejon-babilejon kun retaj amikoj, kaj; spertu nun konstruatan apon de Esperanto-Japana Vortaro de JEI.
Aplikado de ĉinaj skribsignoj al Esperanto kaj utiligo de la kreita apo por Esperanto-lernado	Ekspozicianto proponas metodon por asigni ĉinajn skribsignojn al Esperanto kaj novan lernomanieron de Esperanto per la apo kreita por tiu asignado.
La propono pri klavaro por tajpi literojn kun supersigno	Ekspozicianto montros tajpadon per la klavaro, kaj disdonos broŝurojn klarigantajn la klavaron.
Ponto	Libroj kaj akcesoraĵoj
Projekto Babel	Sanpaga revuo pri niaj aktivadoj
Japana Esperanto- Instituto	Reklamo de la organizo kaj diversaj informoj pri Esperanto-movado

Laŭvolaj Eventoj

En la 21-a de septembro (dimanĉo) 18:30–21:00 [Hotelo Sun-Peach]

Bankedo

Bufedstile la ĉeestantoj libere ĝuas pretajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (senalkoholajn) babilante kun iu ajn en la ĉambro. Ne mankas ankaŭ ludoj, prezentaĵoj, kantoj, ktp.



En la 22a de septembro (lundo) 13:30–18:00

Duontaga Ekskurso

Ni vizitos kelkajn najbarajn vidindejojn. Estas jenaj tri kursoj. Bonvolu kolektiĝi ĉe la renkontiĝejo antaŭ la forirhoru 13:30. Ĉiuj kursoj revenos al la stacio Okayama je 18:00. Pri detaloj ni informos partoprenontojn en la kongresejo.

(1) Kurso Okayama (Kastelo Okayama/Ĝardeno Korakuen)

Per tramo ni vizitos la Kastelon Okayama kaj la Ĝardenon Korakuen, konatajn kiel unu el la tri grandaj ĝardenoj de Japanio.

Renkontiĝejo: Vestiblo sur la unua etaĝo (teretaĝo) de la kongresejo



(2) Kurso Kurashiki A

(Arta Muzeo Ohara + Estetika Areo en Kurashiki)

Ni unue vizitos la Artan Muzeon Ohara, unu el la tri ĉefaj artmuzeoj de Japanio. Poste vi promenos tra la Estetika Areo en Kurashiki, kie tradiciaj stratpejzaĝoj restas.

Renkontiĝejo:

Piedira ferdeko ĉe la okcidenta elirejo de la stacio Okayama



(3) Kurso Kurashiki B (Estetika Areo en Kurashiki)

Ni promenos tra la Estetika Areo en Kurashiki. Tie troviĝas multaj vendejoj, kafejoj, ktp.

Renkontiĝejo:

Piedira ferdeko ĉe la okcidenta elirejo de la stacio Okayama

En la 23-a de septembro (mardo) 9:00–16:30 [Hotelo Sun-Peach]

Postkongresa Ekskurso

Ni kune vizitos jenjn tri lokojn en la orienta parto de Gubernio Okayama per buso.

Foriro (9:00) kaj reveno (16:30) estas de la okcidenta elirejo de la stacio Okayama. Pri detaloj ni informos partoprenontojn en la kongresejo.

Ceramiko Bizen-yaki (Ceramikfarado en “Bizen MuGenAn”)

Ceramiko Bizen-yaki estas unu el la plej malnovaj ceramiko en Japanio, kiu daŭras ekde mezepoko. Ceramiko Bizen-yaki estas karakterizita per sia ekstrema simpleco sen glazuro kaj sen ornamado. Pli malmolaj ol ceteraj ceramikaĵoj estas tiuj de Bizen-yaki, bakitaj je alta temperaturo de 1 200 ĝis 1 300 gradoj dum



proksimume du semajnoj. Krome, oni diras, ke en la vazo de Bizen-yaki akvo ne putriĝas kaj aranĝitaj floroj restas freŝaj longtempe. Povas esti, ke subtilaj truoj kaj dikeco de la vazo tenas kvaliton de akvo.

Partoprenantoj havos sperton pri Ceramiko Bizen-yaki en ceramikfabriko “Bizen MuGenAn”. Oni knedos argilon, formos vazon. Poste fabrikistoj bakos ĝin, kaj la preta produkto estos ekspedita rekte al la hejmo de la produktanto. (Sendkosto estas inkluzivita en la kotizo.)

Lernejo Shizutani

Lernejo Shizutani estis fondita en 1670, en la frua Edo-epoko. Ĝi estas la plej malnova lernejo por ordinaruloj en Japanio. Ikeda Mitsumasa, tiama daimio (feŭdestro) de Okayama, admiris la lokon kiel bonan lokon por lernado, kaj decidis fondi la lernejon por trejni lokajn gvidantojn.



En aprilo 2015, ĝi estis agnoskita kiel unu el la “Japanaj Heredaĵoj”. Oni taksis ke, la spirito de la edukado en la frua moderna epoko puŝis antaŭen la modernigon de Japanio, kaj ke la spirito estas heredita en la nuna epoko.

Granda dolĉaĵejo de “Dagashi”

“Dagashi” estas japanaj malkaraj dolĉaĵoj kaj manĝetoj. Ĉi tie troviĝas ĉirkaŭ 5 000 specoj da “dagashi”-oj kaj infanaj ludiloj. Oni povas aĉeti ilin nur per kontanta mono.

